Surbaze de la pritakso prilaborita en la antaŭaj ĉapitroj, oni povas estigi iujn konsiderojn pri hipotezoj celantaj al perfektigo de la sistemo; oni ilin diskutos kiel se ili estus proponoj kiuj ekestas de slipo-modelo por inform-kolekto: pri ĉiu slipo-parto oni aldonos rimarkojn celantajn pliajn diskutojn. Rimarkoj pri ĉiu slipo-parto venos post pli ĝeneralaj notoj pri la problemo de la "kampoj dum serĉado" kaj "je apero". Fine oni pridiskutos la apartajn problemojn pri la "algoritmo 2/3" kaj pri la regulo de la priskribilo kiu estas taksata tia nur se ⩾3 literoj.
Oni vidu paralele je figuro 6 la nunan skemon por inform-kolekto kaj la novan proponitan hipotezon.

Rimarkoj pri kampoj aŭ sektoroj "je apero" kaj "dum serĉado" en la aktuala formo

Dum la distingo en 3 sektoroj estas sufiĉe klara de la dokumentada vidpunkto, kiam oni parolas pri "kampoj" necesas prilabori kelkajn konsiderojn, kiuj klarigu la diferencon inter kampoj "je apero" kaj kampoj "dum serĉado". Fakte, se la pretigo de la informoj kaj la apero de la respondo konservas la distingon[19], dum la serĉado la sistemo laboras en du kampoj: la unuan konsistigas nur la sektoro 1 kaj oni povas ĝin trafi per

la serĉo pere de la nomo de la aŭtoro; la duan konsistigas la kampoj 1, 2, 3 kaj oni povas ĝin trafi pere de la serĉo per priskribiloj. Oni devas konsideri ke per la serĉo pere de la aŭtoro sufiĉas ke la sistemo trafu nur unu el la vortoj proponataj, dum la serĉo per priskribiloj postulas la retrovon de almenaŭ 2/3 el ili. Tial, estas eble traserĉi ankaŭ kiel oni klarigos en la venontaj linioj, krom per la metodoj konataj:
- *serĉo per aŭtoro:* serĉi priskribilon (sed ne pli ol unu[20]), kiu povas ne esti la aŭtoro, nur en la titoloj.
- *serĉo per priskribiloj:* serĉi per pluraj priskribiloj kiuj apartenas al la tre malsimilaj kampoj (ekz. nomo de la aŭtoro + priskribilo + nomo de urbo en la adreso). Tiu ebleco montras perspektive interesajn serĉojn kiel "kio estas skribita pri iu temo en landoj de orienta Eŭropo", sed estas evidente ke tiuj perspektivoj estas pli bone sekvendaj pere de akurata indikaro (kiu estas klarigata en ĝia metodologia esenco je *Rimarkoj pri sektoroj 3 kaj 6 (Adresse/Adreso).*

<table>
<tr><th>N° sekt.</th><th>Nomo de sekt.</th><th colspan="3"></th></tr>
<tr><td>1</td><td>Kapo/Kopf</td><td colspan="3">Mužiĉ, V.; Weltner, K.: Lernprocezoj en Universitato . . . . . .</td></tr>
<tr><td>2</td><td>Resumo/Knapptext</td><td colspan="3">. . . . . .</td></tr>
<tr><td>3</td><td>Adreso/Adresse</td><td colspan="3"></td></tr>
<tr><td>4</td><td>Numero dok./Dokumentnummer</td><td colspan="3">| | | | | | | | | | | | |</td></tr>
<tr><td>5</td><td>Aŭtoro/Autor</td><td colspan="3">Mužiĉ + Vladimir, Weltner + Klaus</td></tr>
<tr><td>6</td><td>Adreso/Adresse</td><td>| | | |%1| | | | |</td><td colspan="2">%2</td></tr>
<tr><td></td><td></td><td>Lando Urbo-kodo</td><td colspan="2">Nomo de la urbo</td></tr>
<tr><td></td><td></td><td>%3</td><td colspan="2">%4</td></tr>
<tr><td></td><td></td><td>Strato</td><td colspan="2">Nomo de la instituto</td></tr>
<tr><td>7</td><td>Titolo/Titel</td><td>| | | | |%1</td><td colspan="2">%2</td></tr>
<tr><td></td><td></td><td>Ling.T.d.</td><td>orig. titolo</td><td>tradukita titolo</td></tr>
<tr><td>8</td><td>Revuo/Zeitschrift</td><td colspan="3">| | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |</td></tr>
<tr><td></td><td></td><td colspan="3">Revu-kodo, -tipologio, -aperado, -dato, ktp.</td></tr>
<tr><td>9</td><td>Resumo/Knapptext</td><td colspan="3">| | | |(Kodo de la kompilanto) . . . .</td></tr>
<tr><td>10</td><td>Klasifikado/Klassifikation</td><td colspan="3"></td></tr>
</table>

figuro 6

Rimarkoj pri la sektoroj 1 (Kopf/Kapo) kaj 5 (Autor/Aŭtoro)

Kiel jam substrekite, estas oportune ke la antaŭnomo de la aŭtoro estu kompleta por eviti homonimecon senutilan. Tre utila por la aŭtomata prilaboro de informoj estas la enigo de priskribilo (ekz. iu '+' inter la nomo kaj la antaŭnomo) por distingi la aŭtorojn. Utila ja por listigi la nomojn aŭ por laŭ-aŭtoraj bibliografioj[21].

Rimarkoj pri la sektoroj 2 kaj 9 (Knapptext/Resumo)

Estas nenio kroma, escepte de la neceso konfirmi la limon de 250 vortoj (rekomendoj ISO) kaj uzi mallongajn frazojn. La plej taŭga ŝajnas la aŭtora aŭ redakcia resumo, pro fideleco al la originala verko kaj tempo-ŝparo; tamen ĝi ne estas facile enkondukebla[22]. Ankaŭ utila la indiko de la kompilanto: per kodo oni povas distingi ĉu temas pri aŭtora resumo aŭ redakcia aŭ memorigi la nomon de la spertulo kompilinta.

Rimarkoj pri la sektoroj 3 kaj 6 (Adresse/Adreso)

Oni devas tuj rimarki, ke en la proponata hipotezo, estus necesaj pliaj sektoroj 6 en la kazo de artikoloj skribitaj far pluraj aŭtoroj. Due, ŝajnas grave antaŭvidi kodon por la lando al kiu apartenas la aŭtoro kaj priskribilo (%1, %2, . . .) por la aliaj informoj: tio ebligas pli bone ellabori tiujn informojn kaj eĉ organizi pli precizajn serĉ-kriteriojn. La kodo de la lando ebligus selekti la dokumentojn laŭ kontinentoj, laŭ grupoj da landoj kaj laŭ unuopaj landoj, donante, ekzemple, la kodon 1 je la unua ĉelo al ĉiuj aŭtoroj loĝantaj en Eŭropo, la kodon 2 al ĉiuj aŭtoroj loĝantaj en Usono, ktp.; kaj la kodon 1 je la dua ĉelo al ĉiuj aŭtoroj loĝanta en orienta Eŭropo, la kodon 2 al ĉiuj aŭtoroj loĝantaj en okcidenta Eŭropo, ktp.: kaj finfine postlasante la ĉelojn 3 kaj 4 por la kodoj de la unuopaj landoj. Estas finfine substrekinde, ke la plej grava malfacilaĵo koncerne la adresojn estas ties ĝisdatigo kaj la homogeneco inter pluraj dokumentoj de la sama aŭtoro; ĉi-rilate ekzistas proceduroj kiuj ebligas korekti nur unu fojon la informon kaj ĝin enmeti aŭtomate en ĉiujn dokumentojn[23]: ilin utiligi ebligas malgrandigi la erarprobablojn kaj pli rapidigi korektojn kaj ĝisdatigojn.

Rimarkoj pri la sektoro 4 (Dokumentationsnummer/Numero de la dokumento)

Ne forlasenda la numero de la dokumento kiu povas enteni, interalie, la jaron en kiu la resumo estis kompilita kaj la kodon de la eventuala centro kiu prizorgis la analizon de la originalo.

Rimarkoj pri la sektoroj 7 (Titel/Titolo) kaj 1 (Kopf/Kapo)

Koncerne la sektoron 7 oni devas konstati la oportunecon ĝin dividi de la sektoro 5 kiu koncernas la aŭtoron. Tio nuligas la malcertecojn kiujn povas okazigi iu serĉado pere de priskribilo en iu sektoro en kiu estas ĉu la aŭtoro ĉu la titolo, kaj problemojn kiel tiuj kiujn oni renkontis per la serĉ-temo H. Grava estas krome la distingo inter originala titolo (priskribilo %1) kaj tradukita titolo (%2): ambaŭ povas esti utiligataj en serĉado, sed estas oportune ke, je la apero, ili estu disigitaj. Fine ŝajnas oportunaj la kodoj de la lingvo kaj de la dokument-tipo (artikolo aŭ referaĵo ĉe kongreso, recenzo, ktp.).

Rimarkoj pri la sektoro 8 (Zeitschrift/Revuo)

Estas konsilinde labori pere de "fiksaj kampoj" por garantii homogenecon de informoj. Estas oportune ke la revuo havu kodon kiu sin rilatas al la titolo (kompleta aŭ mallongigita, laŭ necesoj) de la revuo: tiu ĉi lasta memkompreneble aperos, garantiante homogenecon. Utila la revu-tipologio por distingi sciencajn revuojn de la gazetaro kaj de eventualaj aliaj publikaĵoj kiel kongresaktoj, honor-studoj, ktp.

Rimarkoj pri la sektoro 10 (Klassifikation/Klasifikado)

Klasifikado ne estas forlasebla, ĉar ĝi estas ege utila precipe por serĉado kune kun la vortoj. La tasko elekti la plej taŭgan klasifikadon estas kompreneble de la mastrumantoj de la sistemo.

Finaj rimarkoj pri la serĉ-metodoj

i) *"algoritmo de 2/3":* oni konstatis kiel la regulo de 2/3 kaŭzas kelkfoje fortan bruon (3 priskribiloj) kaj kelkfoje limigas la retrovon (4 priskribiloj). Unua konstato estas ke la algoritmo de 2/3 neniel povas anstataŭi la logikan /AŬ/, ĉar estas evidente ke oni ne povas ricevi: *X* /KAJ/ (*Y* /AŬ/ *Z*), sed ke oni havas (*X* /KAJ/ *Y*) /AŬ/ (*X* /KAJ/ *Z*) /AŬ/ (*Y* /KAJ/ *Z*). La solvo de 2/3 povus esti interesa se ĝi estus utiligata ene de koncepta serĉado "pezata": tio signifas, ke, en la hipotezo de serĉado pere de 3 priskribiloj, oni povus ankaŭ akcepti dokumenton kiu entenus nur du, sed en specifaj kondiĉoj de: *Proksimeco* = nur se la du priskribiloj estas unu flanke de la alia aŭ (hipotezo malpli restrikta) nur se ili estas entenataj inter du interpunkci-signoj kiuj difinas kompletigitan frazon (:/;/./?/!). *Loko* = nur se la du priskribiloj estas en la titolo; *aperado* = kondiĉe ke ambaŭ la priskribiloj estu *N* fojojn en la mema dokumento. Ni prenu la kazon de priskribiloj kiuj dum la provoj donis al ni plurajn problemojn: *instru-/komput-/program-*; povus esti utile trovi dokumenton en kiu ne aperas la radikalo *komput-*, sed en kiu la aperado de *instru-* kaj *program-* aŭ ties esto en la titolo komprenigu ke la dokumento koncernas la programitan instruadon: rilatoj kun la komputilo povas esti pli aŭ malpli proksimaj (ilin serĉi estas ja problemo de la esploristo), sed oni evitus ĉiel akiri dokumenton kiu enhavu la priskribilojn *program-* kaj *komput-* kaj kiu, eĉ en la respekto de la regulo de 2/3, donus al ni temojn specifajn pri programado (software) sen iu specifa rilato al instruado. Memkompreneble ia semantika reto (aŭ strukturita tesaŭruso) ebligus, ekzemple, konsideri inter la *N* aperadoj de iu priskribilo eĉ la koncernajn sinonimojn aŭ proksimajn aŭ rilatantajn vortojn, kiujn oni konsiderus utilajn enigi en la serĉadon por difini la koncepton de la temo.
Fine, se oni pripensus strukturitan resumon, verŝajne pli bone alvenus al la rezultoj, ĉar oni evitus riĉigi la respondojn per ĉiuj kazoj en kiuj iu temo sin prezentas kiel marĝena kaj tial ne grava por la serĉado. Ĉi tie nur eblas aludi al ekzemplo: resumo strukturita laŭ paragrafoj PREMISO, PRISKRIBO, KONKLUDOJ, METODOLOGIO donus al la sistemo la eblecon apartigi iujn kampojn dum la serĉado. Tiel se oni havus la vorton *komput-* en la paragrafo METODOLOGIO, oni povus eviti en la respondo ĉiujn dokumentojn rilatantajn verkojn pri kiuj oni nur kontrolis pere de la komputilo kaj restus je dispono, sen bruo, la dokumentoj en kiuj la komputilo estas integra parto de la laboro farita (ekz. malsimila la kazo de la instruado per komputilo ol iuj instru-paŝoj *sen* komputilo, sed kontrolitaj pere de ĝi).
Nur aludo, je la fino de tiuj ĉi rimarko, al la neceso ke la laboro tiel organizata postulas ke, malantaŭ la sistemo, estu forta engaĝiĝo ĉu por strukturigo de la tesaŭruso eventuala, ĉu por la preparo kaj homogena uzo de kriterioj por kompilado de resumoj.

ii) *regulo de la priskribilo: tia nur se ⩾ 3 literoj*

Surbaze de la provoj (ĉap. 1.1.) kaj laŭ literaturo[24], oni konstatas ke la sistemo, kiam laboras en la lingvo internacia, distingas priskribilojn kun pli ol 3 literoj kaj malpli ol 3

literoj. Tiel oni intencis superi la obstaklon estigita de la fakto ke la komputilo ne sukcesus "retrovi la radikalojn"[25], tiel ke, malagnoskante la vortojn kiuj havas malpli ol 3 literojn, oni sukcesus forpreni de la serĉado "la plej grandan parton de afiksoj kaj finaĵoj tiel kiel la artikoloj"[26]. Tiu solvo kaŭzas plurajn komplikaĵojn kiujn oni povas vidi pere de la sekvanta figuro;

≥3	<3
PREFIKSOJ	
dis- # mal- #	ek- #
eks- # mis- #	di- # [fi-]
pra- #	re- # ge- #
SUFIKSOJ	
-ebl-	[-aĉ-] -ig- #
-ant- #	-ac- # -iĝ- #
-end- #	-ad- # -il- #
-estr- #	-aj- # -in- #
-ind-	-al- # -it- #
-ing- #	-an- # -iv- #
-int- #	-ar- # -iz- #
-ism- #	-at- # [-nj-]
-ist- #	[-ĉj-] -on- #
-ont- #	[-ec-] [-op-]
-obl- #	[-eg-] -ot- #
-oid- #	-ej- # -oz- #
-hidr- #	[-em-] -uj- #
	-er- # [-ul-]
	[-et-] [-um-]
	-id- # -ed- #
KONJUNKCIOJ KAJ ALIAJ	
[ajn] kaj ##	[ĉi] [ke] [ne]
[bis!] kvazaŭ	[ĉu] [nu] [oj]
[ĉar] nek	[do] [ol] aŭ ##
[do] plus	[ha] [se]
[hop] sed	[ho] [ve]
	[hu] [ba]
PRONOMOJ	
[ili] [oni]	[mi] [ci] [li]
	[ŝi] [ĝi] [si]
	[ni] [vi]
NUMEROJ	
cent ses dek	du ok
tri kvar unu	ARTIKOLO + FINAĴOJ
kvin mil naŭ	[la]
sep dekunu,	[-a] [-i] [-as] [-os]
dekdu,	[-o] [-e] [-u] [-us] [-is]
dektri...	

≥3	<3
ADVERBOJ	
[ankoraŭ] [mem]	[eĉ]
[apenaŭ] [nun]	[ju]
[des] [nur]	[ne]
for # [plej]	
[jam] [pli]	
[ja] [plu]	
[jen] [supre] #	
[jes] [tre]	
[ĵus] [tro]	
[tuj]	
PREPOZICIOJ	
antaŭ # per #	al #
apud # [por] ###	[da]
ĉe # post #	[de]
ĉirkaŭ # preter #	el #
[dum] pri #	en #
ekster # pro #	[je]
[ĝis] sen ##	[po]
inter # super #	
krom # sur #	
kun # tra #	
[laŭ] trans #	
KORELATIVAJ VORTOJ	
[neni-]	[i-] [ki-] [ti-] [ĉi-]
SUBSTANTIVOJ/VERBOJ	
	ag- ĝu-
	al-o ### ir-
	am- lu-
	as-o ### od-o
	av-o om-o
	bu-o or-o
	Di-o ov-o
	eĝ-o pi-a
	eĥ-o ŝu-o
	el-o ### ur-o
	er-o ### li-o
	fe-o

figuro 7

Legenda (vidu tamen je la fino de tiu ĉi paragrafo ii)):
[sed] : vorto kun kornico = oni proponas, ke ĝi estu taksata "malplena".
: vorto en serĉo nur se ligita al alia priskribilo pere de rigora distanclimigilo
: vorto valida nur se taksata laŭ logika funkcio (alie = malplena)
: N.B. = ekzistas ankaŭ por-o;necesas iel distingi al #/al-o, [-as]/ as-o, el #/el-o, -er- #/er-o.
Vortoj sen signoj: oni konservu en serĉado kiel aŭtonomaj priskribiloj.

- Unua rimarko estas ke oni ne povas serĉi gravajn radikalojn kiuj koncernas substantivojn aŭ verbojn; iuj estas tipaj de la ĉiutaga lingvo (*ag-*, *am-*, *av-*, *ŝu-*), sed la aliaj estas plejparte teknikaj kaj tiel gravaj en informo-bazo ankaŭ kaj precipe pro tiu ĉi kialo.
- Dua rimarko estas ke oni povas konstati malhomogenecon ene de iuj kategorioj; oni ne komprenas kial la numeroj 2 kaj 8 ne povas ricevi la dignecon de priskribiloj kiel la aliaj numeroj, aŭ kial, inter la pronomoj, nur *ili* kaj *oni* estas priskribiloj. Oni povas daŭrigi, reliefante ke la sufiksoj de la pasinta participo ne estas priskribiloj, dum tiuj de la prezenca jes (oni ja vidis la konsekvencojn: temo D2 je la ĉapitro 1.1) kaj same la eblecon serĉi la koncepton de profesio (*-ist-*), sed ne tiun de ina sekso (*-in-*).
- Tria rimarko koncernas du konjunkciojn (*kaj/aŭ*) kaj prepozicion (*sen*) kiuj estas tre gravaj en la serĉado de informoj, kiam oni donas al ili logikan valoron. Fakte, kiam oni donas al la uzanto la eblecon enigi la priskribilojn kune kun konjunkcioj kaj prepozicioj, li pensas ke la sistemo estas kapabla interpreti la vortojn enigitajn kaj distingi *kaj* de *aŭ*, de *sen*; verdire la sistemo ne faras tion, ne konas logikan valoron de /KAJ/, /AŬ/, /SEN/ kaj eĉ interpretas *kaj* kaj *sen* kiel priskribilojn ĉar ≥ 3 (!!)[27]. Kiaj ajn estu la solvoj, estas necese ke uzanto sciu tre precize ke la enigo de priskribiloj laŭ ĉiutaga lingvo estas neefektiva kaj ke li devas zorge demandi la sistemon por eviti tre bruajn respondojn.

Surbaze de tiuj konsideroj, oni povas klopodi estigi alternativan proponon kiu ebligu eviti la plej gravajn malcertecojn:
a) doni al /KAJ/, /AŬ/, /SEN/ la efektivan valoron logikan, forprenante ilin de la priskribilaro;
b) nuligi la distingon inter priskribiloj ≥ 3 kaj < 3 literoj;
c) labori pri prepozicioj, konjunkcioj, ktp. estigante liston de malplenaj vortoj (t.e. vortoj kiuj neniam povas esti utiligataj en la serĉado).
ĉ) konservi por iuj sufiksoj, prefiksoj kaj prepozicioj la valoron de priskribiloj nur se eblas ilin kunligi kun alia priskribilo pere de rigora distanc-limigilo: ekzemple, havas nenian signifon la serĉado de la priskribilo kiu karakterizas la profesion (*-ist-*) sen kunligo al la priskribilo kiu ĝin konigas (*instru-/meti-/kurac-*)[28]. La graveco de tiu ĉi solvo estas evidenta: oni pripensu ke nun ne eblas distingi dokumenton kiu, ekzemple, pritraktu problemon de egalrajteco de virinoj, unue ĉar *-in-* (la sufikso kiu koncernas inan sekson) estas malpli ol 3 litera, due ĉar, eĉ se estus eble ĝin trovi, ĝi estus trovita ne nur flanke de *vir-* (kaj la radikalo *egal-*, kompreneble), sed ankaŭ flanke de *patr-*, *av-*, *ĉeval-*, kiuj estas ĉiuj radikaloj kiuj absolute ne interesas nin.

Por doni konkludon, ni revenu al la figuro 7 , kaj klopodante forgesi la distingon de la priskribiloj pli aŭ malpli ol 3 literaj, oni pristudu liston de malplenaj vortoj[29]; la propono celas veki debaton; la vortoj kiujn oni volas taksi malplenaj estas en kornico.
La propono ke iuj vortoj havu valoron nur se proksimaj al aliaj (*in-* nur se kun alia radikalo antaŭe) ebligus ankaŭ superi iujn malfacilaĵojn en la estigo de la priskribiloj (ekzemple: *ge-patr-o-j* aŭ *gepatr-o-j*? *Esper-ant-o* aŭ *Esperant-o*? *Inter-naci-a* aŭ *Internaci-a*?). Estas ja perspektivo de laboro tre tikla precipe por lingvistoj, kiuj povus celi kunligi la lingvajn studojn kun la necesaj plibonigoj de la fundamentaj teknikoj por la aŭtomata retrovo de la informoj.

3. *Notoj*

[1] FEoLL: Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierte Lehr- und Lernverfahren

[2] Kompleta prezentado de la projekto povas utile esti legata en FRANK(1982), pp.52-57. Teoriaj bazoj de la projekto estas ja en FRANK(1975).

[3] Tiuĉi aparta projekto enestas inter la klopodoj, jam disvastiĝintaj en Eŭropo, estigi la tiel nomatajn „serĉad-registrojn": interese estas ja konsideri, ke la limo inter tiuj informoj kaj la personaj informoj ne estas facile difinebla, kun la konataj problemoj pri respekto de la „privateco".

[4] La distingo evidentigas la econ: a) numeran, statistikan kaj „faktecan" de la informo-bankoj; b) bibliografian, ne faktecan de la informo-bazoj.

[5] Pri resumo oni ĉi tie elektas difinon ampleksan, t.e. kuneston de informoj pri publikigita teksto kiuj enhavas la aŭtoron, la titolon, klasifikadon, indikaron kaj sintezon de la originala teksto.

[6] Ĉi tie oni nur aludas al la elementoj de la programo kiuj estas esencaj por kompreni la sekvantajn pritaksojn de la sistemo kaj nur estas elprenitaj de la internaj paperoj aŭ de la artikoloj sube menciitaj. Kiu ajn alia konsidero, kiu evidentiĝis dum provoj, estas poste pritraktata en la ĉapitro 2. Por pli profunda kono de la demando-teknikoj, vidu: MEYER(1979); ekzistas ties kroma versio MEYER(1981).

[7] Pri la uzado de la sistemo koncerne tiun econ, vidu MEYER(1979). Por kompleta kono de la problemo kaj de la perspektivoj, vidu FRANK(1979).

[8] Eblas ke dum la pritrakto estiĝu problemoj koncernantaj la mastrumantojn de la sistemo, tamen la ĉefa atento estos por la uzantoj. Pri la ĉefaj ecoj de la parametroj ekzistas ja ek de la 60-aj jaroj konstanta literaturo (CLEVERDON kaj poste SALTON, pp.282-283) kun kromaj postaj detaligoj VICKERY.

[9] SALTON, pp.283-284

[10] Revoko = (nombro de la dokumentoj retrovitaj kaj taŭgaj)/(nombro de la taŭgaj dokumentoj)
Precizeco = (nombro de la dokumentoj retrovitaj kaj taŭgaj)/(nombro de la retrovitaj dokumentoj)

[11] En la arkivo oni konstatis la ekziston de kompleksa temaro koncerne al la elektita ĉeftemo: ja estas: referaĵoj, metodologio pri instruado per komputilo (8 dokk.); programaro (software) speciala (4 dokk.); interfakaj problemoj (2 dokk.). Per la temo A oni klopodas serĉi ĉiujn aspektojn de la problemo.

[12] En la arkivo ekzistas nur unu dokumento kiu pritraktas la problemon en la priskribita senco. Oni klopodis ĝin trafi ne per ĵargono „molaj/malmolaj sciencoj", sed per la plej ĝenerala terminologio „ekzaktaj, homaj, sociaj sciencoj".

[13] En la arkivo la temo de la internacia lingvo disvolviĝas laŭ pluraj vidpunktoj: lingvo-planado, historio de la internaciaj lingvoj, lingvaj analizoj, ktp. Oni klopodis trafi la taŭgajn dokumentojn sen celi tro detalajn distingojn.

[14] Enketo kaj artikolo kiuj enhavas ĝisfundajn pritaksojn estas la dokumentoj taŭgaj. Konstatinte la bruon de A1 kaj A2, oni ne uzis la priskribilon PER.

[15] Pluraj kaj diversspecaj estas ja la dokumentoj kiuj rilatas al la programado (software). Inter la 12 pritaksataj taŭgaj estas dokumentoj kiuj koncernas programojn por didaktika ilaro aŭ por aŭtomata kreado de radikoj aŭ por planado de lern-organizo en metropolo, ktp.

[16] En tiu ĉi kazo oni klopodis trafi la ununuran dokumenton kiu pritraktas la problemon laŭ ĝenerala vidpunkto. Oni supozas, ke la esprimo „lingvo-planado" estu unusenca.

[17] Oni eĉ laboris per la temoj G kaj H, malgraŭ la ne ekzisto de taŭgaj dokumentoj: oni celis kromajn kontrolojn pri bruo.

[18] Inter la aliaj, kp. BERNIER, BORKO.

[19] Priskribita en MEYER(1979).

[20] Je konfirmo, oni konstatas, ke la serĉado per la priskribiloj *instru-ad-o komput-il-a* pere de la serĉ-ebleco AŬTORO donis kiel respondon ĉiujn dokumentojn kiuj en la titolo havis aŭ *instru-* aŭ *komput-*. Oni povus iel estigi logikan operacion /AŬ/; ties valoro estas tamen limigita de la fakto ke aliaj priskribiloj en /AŬ/ ne povas esti ligitaj kun /KAJ/ al alia priskribilo (ekz.: (*komput-il-a*/AŬ/*aŭtomat-a*/AŬ/*kibernetik-a*/AŬ/*komputor-a*)/KAJ/*instru-ad-o*) kaj de la fakto ke tiu ĉi operacio povas okazi nur sur la aŭtoro kaj la titolo.

[21] Pli ĝenerale, pri la proceduroj por estigi presitajn bibliografiojn ek de aŭtomataj arkivoj, vidu STOPPOLONI (1981).

[22] Pri la problemo, ĉefe rilatante al la resumo sur italaj juraj revuoj, kp. STOPPOLONI (1979). Pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj respektive de la aŭtoraj, redakciaj, aŭ spertulaj resumoj ekzistas ampleksa debato; komence, inter la aliaj, vidu ASHWORTH kaj BERNIER.

[23] STOPPOLONI (1982)

[24] FRANK (1982), p.54

[25] FRANK (1982), p. 54: verŝajne oni volis diri „la artikolon" ĉar en Esperanto ekzistas nur la artikolo *la*.

[26] Vidu noton 25.

[27] Fakte, petante *kaj* en serĉado, la sistemo respondas, ke ekzistas 69 dokumentoj en la arkivo.

[28] Kiel oni konstatis pere de la serĉo D1.

[29] Finaĵoj *-o, -a, -e* povas esti „malplenaj vortoj" nur se ekzistas distanc-limigilo (ekz. se oni povas serĉi la priskribilojn *soci-* kaj *scienc-* kondiĉe ke ili estu proksimaj, tio igas ne necesan la distingon inter *soci-* = adjektivo kaj *scienc-* = substantivo).

Literaturo

ASHWORTH,Wilfred: Abstracting; en: ASHWORTH,W.(ed.): Handbook of Special Librarianship and Information Work, London 31967, pp.453-481.

BERNIER,C.L.: Abstract and Abstracting; en: Encyclopedia of Library and Information Science, vol.1, pp.16-38.

BORKO,H. & CHATMAN,S.: Criteria for Acceptable Abstracts: a survey of abstracters' instructions; en: *American Documentation*, apr. 1963, pp.149-150.

CLEVERDON,C.W.: Identification of Criteria for Evaluation of Operational Information Retrieval Systems, Cranfield College of Aeronautics, 1964.

FRANK,H.G.(1975): Plansprachliche Dokumentation; en: *Nachrichten für Dokumentation*, (26) 1975,1, pp.17-21.

FRANK,H.G.(1979): Planlingva dokumentado; en: CARLEVARO,T. & LOBIN,G.: Einführung in die Interlinguistik, Alsbach 1979, pp.199-207.

FRANK,H.G.(1982) et al.:Aŭtomata planlingva dokumentado per la sistemo PREDIS; en: FRANK et al.(ed.): Lingvokibernetiko/Sprachkybernetik, Tübingen 1982, pp.52-57.

MEYER,Ingeborg(1979): Vorführung des gegenwärtigen Standes des Plansprachlichen Rechnerdialogsystems PREDIS; en: 3. Werkstattgespräch Interlinguistik in Wissenschaft und Bildung/3-a laborkonferenco Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo, Paderborn 1979 (=Paderborner Arbeitspapiere 47), pp.93-94.

MEYER,Ingeborg(1981): La Planlingva Retrova Dialog-Sistemo PREDIS; en: *Komputado*, HEA, Budapest 1981, pp.30-35.

SALTON,G.: Automatic Information Organization and Retrieval New York 1968, McGraw Hill.

STOPPOLONI,Slivio(1979) et al.: Informazione giuridica e abstract, IDG/CNR, Firenze 1979, pp.ix-36.

STOPPOLONI,Silvio(1981) et al.: Bibliografia idg. Documentazione automatica e pubblicazioni a stampa: una sintesi per l'informazione giuridica, en: *Informatica e diritto*, VII(1981),2-3, pp. 273-285.

STOPPOLONI,Silvio(1982) & SABATO,G.: Analisi delle citazioni: spunti metodologici, en: *Quaderni dell'Istituto di studi e ricerche sulla documentazione scientifica del CNR*, n.10, Roma 1982 (en preparo).

VICKERY,B.C.: Techniques of Information Retrieval, London 1970, Butterworth.

Ricevita 1982 - 09 - 22

Adreso de la aŭtoro:
D-ro Silvio Stoppoloni, Via Bandinelli, 55/4, I-50142 Firenze

PREDIS - Plansprachliches REchner-DIalog-System - Computer Dialogue System in a Planned Language - an examination of its present state and prospects of further development (Summary)

A brief survey of the information retrieval system PREDIS is followed by its application to an experimental data-bank in Esperanto at FEoLL in Paderborn.
On the basis of recall and precision values we note that retrieval by two descriptors is not sufficient for obtaining general conclusions, by three causes a large amount of noise and by four substantially minimizes the recall capability. A detailed analysis of the various causes of noise and of "misses" is also made. The necessity of linguistic improvements is apparent (a thesaurus, a stricter regard for the use of affixes and prepositions). An analysis of response-times shows up the possibility of time-saving improvements in some parts of the system. The last chapter of Part One consists of a presentation of the documents available and their usability.

Part Two deals with the feasibility of introducing new criteria for the organization of stored information with additional details (country, language, dates, article and journal typology etc.).

The article concludes with final remarks about the "2/3-algorithm" (a document is accepted if it contains at least two thirds of the descriptors sought) and linguistic problems concerning "empty" words. These would be the appropriate points of interest for information scientists and linguists.

PREDIS - Plansprachliches REchner-DIalog-System - Bewertung und Ausblick (Kurzfassung)


Einem kurzen Überblick über das Informationserschließungssystem PREDIS folgt dessen Anwendung auf eine experimentelle Datenbank in Internacia Lingvo im FEoLL Paderborn. Auf der Basis von Finde- und Genauigkeitswerten stellen wir fest, daß ein Wiederfinden mittels zweier Deskriptoren keinen allgemeinen Schluß zuläßt, mittels dreier Deskriptoren einen großen Störanteil verursacht und mittels vier Deskriptoren die Wiederfindekapazität beträchtlich schmälert. Eine detaillierte Analyse der verschiedenen Störungsursachen und der „Ausfälle" wurde durchgeführt; offensichtlich sind linguistische Verbesserungen notwendig (ein Thesaurus, eine genauere Beachtung von Affixen und Präpositionen). Eine Analyse der Wartezeiten zeigt die Möglichkeit von Zeiteinsparungen in einigen Teilen des Systems. Das Schlußkapitel des ersten Teils besteht in einer Auflistung der verfügbaren Dokumente und deren Verwendbarkeit.

Teil 2 behandelt die Möglichkeit, neue Kriterien für die Organisation gespeicherter Information mit zusätzlichen Einzelheiten einzuführen (Land, Sprache, Art der Daten des Artikels und der Zeitschrift usf.).

Der Artikel schließt mit Schlußbemerkungen über den „2/3-Algorithmus" (ein Dokument wird gemeldet, wenn es wenigstens 2/3 der gesuchten Deskriptoren enthält) und linguistische Probleme in Zusammenhang mit „Trivialwörtern". Dies könnte angemessene Ansätze für weitere informationswissenschaftliche und linguistische Forschungen bilden.

Wir trauern um unser Beiratsmitglied

Prof. Dr. Ing. Georges R. Boulanger,



16.1.1909 - 23.8.1982

der im Alter von 73 Jahren unerwartet verstorben ist.

Er studierte und promovierte in Paris (sciences mathématique) und war bis zu seiner Emeritierung als Professor für Maschinenkonstruktion an der Polytechnischen Fakultät in Mons (Belgien), sowie als Honorarprofessor mehrerer Universitäten (insbesondere der Universität Libre Bruxelles) tätig. Er trat als Verfasser verschiedener Schriften über Kybernetik, Elektronik, Automation und Lehrmaschinen hervor. 1956 organisierte er den ersten Internationalen Kybernetikkongreß in Namur (Belgien) und gründete dort ein Jahr später als Trägerin der Nachfolgekongresse die Association Internationale de Cybernétique, deren Präsident er 25 Jahre lang bis zu seinem Tode war. Leider konnte er den 10. Internationalen Kybernetikkongreß, der vom 22. bis 27. August 1983 wieder in Namur stattfinden wird, und bei dem er einen Nachfolger vorschlagen wollte, nicht mehr erleben.

Schon frühzeitig vertrat Boulanger mit viel persönlichem Engagement und wissenschaftlichem Weitblick die Bildungstechnologie und war u.a. Mitbegründer der Gesellschaft für Pädagogik und Information (GPI, früher: Gesellschaft für Programmierte Instruktion), deren Kongresse er zweimal als Ehrenpräsident belebte. Ebensoviel Zukunftshoffnung bewies er durch sein Eintreten für eine internationale Zweitsprache. Er erlernte noch als 70-jähriger die Internacia Lingvo (Esperanto), war Vizepräsident des Europaklubs und setzte durch, daß die Internacia Lingvo 1980 zur 3. Arbeitssprache des 9. Internationalen Kybernetikkongresses in Namur wurde.

Seine Weltoffenheit und Begeisterungsfähigkeit, sein humorvolles und tolerantes Wesen, seine fachliche Kompetenz und sein Durchsetzungsvermögen trugen nachhaltig zur Förderung der Kybernetik bei und sicherten ihm die Bewunderung seines weltweiten Freundeskreises, der noch bis zu den letzten Wochen seines Lebens ständig wuchs.

Mitteilungen * Sciigoj * News * Nouvelles

Mitteilungen des Instituts für Kybernetik Berlin e.V.

Direktor: Prof.Dr.Uwe Lehnert

Anschrift: Freie Universität, Standort Lankwitz, Malteserstr. 100, D-1000 Berlin 46

Bankverbindung: Konto Nr. 61 230 37500 bei der Berliner Bank, BLZ 100 200 00

Redaktionelle Verantwortung: Prof.Dr.Uwe Lehnert

Zum 1.12.1982 gilt folgende Mitgliederliste

1. Aktive Mitglieder:

BINK, Dr. W. D. Ekkehard, Wittenbergener Weg 61 A, D-2000 Hamburg 56
BONNKE, Erhard, Malteserstr. 74-100, D-1000 Berlin 46
FISCHER, Prof. Dr. Hardi, ETH Zentrum TUR, CH-8092 Zürich
FRANK, Prof. Dr. Helmar, Kleinenberger Weg 16 A, D-4790 Paderborn
GEISLER, Dipl.-Päd. Evelyn, Riemekestr. 17 B, D-4790 Paderborn
GUNZENHÄUSER, Prof. Dr. Rul, Manosquerstr. 41, D-6022 Leinfelden-Echterdingen
HIRSIG, Prof. Dr. Réné, Attenhoferstr. 9, CH-8044 Zürich
JANSEN, Dr. Gerd, Stöteroggestr. 79, D-2120 Lüneburg
JARMARK, Dr. Eugen, Kleinenberger Weg 16 B, D-4790 Paderborn
LEHNERT, Prof. Dr. Uwe, Malteserstr. 74-100, D-1000 Berlin 46
LEHRL, Dr. Siegfried, Kurt-Schumacher-Str. 11, D-4790 Paderborn
LIESKE, Bärbel, Malteserstr. 74-100, D-1000 Berlin 46
LOBIN, Dipl.-Päd. Günter, Sylter Weg 11, D-4790 Paderborn
MEDER-KINDLER, Dr. Brigitte, Talleweg 55, D-4790 Paderborn
PIETSCH, Prof. Dr. Eleonore, Ignatiusstr. 20, D-4401 Havixbeck
REITBERGER, Prof. Dr. Wolfgang, Neudecker Weg 137, D-1000 Berlin 47
REITZER, Dr. Alfons, Mandl-Str. 21, D-8000 München 40
SCHWENDTKE, Prof. Arnold, Tarforsterstr. 43 A, D-5500 Trier
STACHOWIAK, Prof. Dr. Herbert, Taubenweg 11, D-4790 Paderborn

2. Fördernde Mitglieder:

Institut für Kybernetik Berlin und Paderborn GmbH, D-4790 Paderborn

3. Passive Mitglieder:

ALSLEBEN, Prof. Kurd
BEHRMANN, Hermann
BLISCHKE, Klaus
BOURGUET-LEFEBVRE, M.
BULLER, Osmo Huk
CARLEVARO, Dr. Tazio
DINGES, Wolfgang
DIRLEWANGER, Arno P.
FISCHER, Dr. Rudolf-Josef
GROGGER, Dr. Günther
HEINRICH, Prof. Dr. Paul-B.
HOFFMANN, Lothar
HOPPE, Dr. Alfred
KAHRMANN, Dr. Klaus-O.
KAYSER, Carl
KEIL, Dr. Karl-August
KIEMLE, Dr. Manfred
KRIPPENDORF, Klaus
KRONTHALER, Dr. E.
KUHNT, Dr. Ulrich
MRAZ, Dir. Josef
MÜLLER, Gerhard
NIEGISCH, Alfred
PASTORS, Peter
PENNACCHIETTI, Prof. Dr. F.
PRAAST, Siegfried
ROTHMANN, Olga
RUMPFF, Walter
SABITZER, Alfred
SEIPP, Walter
STAUDINGER, Bayer. Staatsb.
STREISAND, Hugo
VON CUBE, Prof. Dr. Felix

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

*

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernêtique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

*

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

*

Forme des manuscrits

D'une manière générale les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées ne peuvent être acceptés. Les références littéraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs oeuvres du même auteur peuvent être énumerées par ordre chronologique. Le prénom de chaque auteur doit être mentionné, au moins en abrégé. Indiquez le titre, le lieu et l'année de publication, et, si possible, l'éditeur des livres, ou, en cas d'articles de revue, le nom de la revue, le titre, les pages (p. ex. p. 317-324) et l'année dans cet ordre. On peut mentionner le titre des articles ayant fait l'objet de publications. Les publications d'un auteur parues la même année feront l'objet d'une classification (telle que a, b etc.). On citera dans le texte le nom de l'auteur, suivi de l'année de l'édition (éventuellement complété par "a" etc.). Evitez les notes en bas de pages.